



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĥikago

Nº 3

Marto, 2015

*Kara Leganto, finfine venis printempo kaj marta numero de nia bulteno "Saluton!" aperis antaŭ viaj legad-avidaj okuloj. Kiel ofte okazis pasinttempe, tri kvaronoj de la enhavo estis speciale verkita por la eldonaĵo.*



*Tre interesa, malofta kaj grava foto estas lokita apude: sur ĝi, post pizza gustumado (pizzon disponigis s-no Randio) estit fiksita samtempe, kompreneble, nia tuta estraro. Ne foto, sed vera raraĵo! –La Redakcio*

## Ĉu Lingva Ĥaoso Minacas Usonon?

Antaŭ dekelkaj dekoj da jaroj la plurlingva Bjalistoko donis al Zamenhofo la ideon pri la neceso de la Internacia Lingvo. Tiam temis pri konfuza mikso de nur kelkaj lingvoj. La nuntempa lingva situacio en la usonaj urbaj komunumoj estas multe pli komplika. Kelkmejlja ekskurso tra Ĥikago donas al la vizitanto la ideon pri la disdivido je tre malsamaj (kaj ofte malamikaj) etnaj najbarejoj. Kolbasa – pola, koŝera – (rus)juda, orkupola – ukraina, pagoda – ĉina, takoa – meksika, multkolora – portorika, orientporda – vjetnama, tumulta – hinda, kebaba – araba, kaj aliaj. Ili nur ŝajne posedas la komunan (usonon) lingvon.

La nunaj enmigrintoj en Usonon evidente ne plu bezonas koni la anglan. Neniu postulas tion, nenio devigas ilin. Ili povas funkcii sen la angla pro popularaj servoj de tradukistoj, tradukitaj tekstoj, aŭtomataj tradukoj, fremdlingvaj gvidiloj, ktp. Eĉ dum la ŝtataj elektoj lastmonate mi rimarkis kun surprizo, ke oni povas oficiale voĉdoni en pluraj lingvoj! Ĉu estas ĝuste kaj juste doni tian privilegion al la ĉinaj, barataj, aŭ arab-devenaj civitanoj, sed ne la samajn al ĉiuj? Kial tamen ne devigi ĉiujn lerni la anglan, kiel mi faris, por ke ĉiuj havu la samajn-kiel-mi rajtojn? Ĉiufoje kiam iu alia lingvo estas oficiale uzata krom la mia denaska (aŭ krom komuna angla), mi sentas min malbone. Kial diable mi lernis la anglan, se la alilingvaj enmigrintoj tion ne devas fari por ĝui la samajn rajtojn kiel mi?

La kreskanta tendenco uzi pli kaj pli da lingvoj oficiale en Usono estas danĝera, ĉar ĝi kondukas al



la neevitebla lingva kaoso. Denaskaj anglalingvanoj ne konscias la problemon, ĉar ili la plimulton de la dokumentoj tamen ankoraŭ povas legi en ilia angla. Nur la eksterusone devenaj enmigrintoj (kiel mi) bone scias kiel malavantaĝa estas la plurlingveco, kun kiu ni ja delonge baraktadas en la resto de la mondo. Eĉ en la plurlingva Hindujo la komuna

lingvo estas la angla, dum en ĝis-nun-sole-anglalingva Usono subite la hinda fariĝas unu el la oficialaj lingvoj. Ho, kia absurdaĵo.

Komparu la nure anglalingvan elektan danko-konfirmilon de antaŭ du jaroj (maldekstra) kun la ĉijara kvarlingva (dekstra). Ĉijare oni jam uzis kvar lingvojn ankaŭ por doni la informojn kiel atingi la voĉdonejon, dissendataj al ĉiuj (malsupre). Kiom da lingvoj oni oficiale uzos por la venontaj elektoj? Kiom tio kostas? Kiom da lingvoj el la miloj da monde uzataj lingvoj funkcias en Ĥikago nun? Certe pluraj centoj. La Urbodomo en Ĥikago jam malprudente fieras, ke oni publikigas oficialajn dokumentojn en sep lingvoj. Kiom kostas tiu sennecesa spezo? Oni ja povus ŝpari multon de la publikaj dolaroj, eldonante publikaĵojn nur en la angla. Kial diskriminacii kontraŭ la lingvoj kiuj restas neuzataj? Ja oni ne povas uzi ilin ĉiujn. Kiu decidas, kiujn lingvojn favori kaj uzi – kaj kiujn ne? Kial?

Kiel esperantistoj ni kredas, ke ĉiu rajtas posedi sian propran lingvon – sed por la komunaj celoj ni preferas uzi la komunan Internacian Lingvon. Simile, mi proponas nur UNU oficialan Komunan lingvon

por tuta Usono: la anglan! Oficiala aplikado de pluraj lingvoj solvas nenion, krom danĝere privilegii iujn kontraŭ la aliaj. Ja vere ne uson-stile!!!

“Pledge of Allegiance” esprimas “one nation indivisible with justice for all”. Kial do lingve disdividi la originale anglalingvan nacion? Mi deziras, ke Usono ne perdu unu el siaj trezoroj – la lingvan unuecon en la angla lingvo.

–Leszek Kordylewski

## K. I. Gałczyński (1905-1953)

Antaŭ kelkaj monatoj nia vic-prezidanto s-no Randio montris dum klubsindo E-poemon de iu K. I. Gałczyński. Evidentiĝis, ke li estas renoma pola poeto, sed pri lia espernatiĝo informo ne estis trovita. Do, Konstanty Ildefons Gałczyński estis pola poeto, tradukisto. Li verkis etosajn lirikajn verkojn, kun eroj da humuro, groteskeco kaj fantazio. En Varsovia Universitato li studis rusan, klasikan kaj anglan literaturon, tradukis V. Ŝekspiron, “Odon al Ĝojo” (nuna himno de EU) de F. Schiller. Por duon-dramatika absur-humura teatro “La Verda Ansero” li verkis (ĝis 1950) li verkis 160 tekstojn. Li ofte uzis pseŭdonomon Karakuliambro. La lasta kaj nomo de teatro “La Verda...” povas nedirekte aludi al lia kono de E-o. Ĉu iu povas helpi aŭ, almenaŭ, trovi originalan polan tekston de la suba poemo? Koran dankon pro la esploroj. Kak nun ĝuu:



### *Kanto de Porko*

Mi estas la porko! Mi kuŝas en sterk'  
Kaj ofte subfosas radikojn de l' kverk'.  
En mia kuŝejo mi kuŝas sen zorg'  
Kaj ĝuas la koton: mi estas la pork'!

Mi vivas porkece en porka mizer'  
Laŭ moroj de porkoj, laŭ porkmanier'  
Kaj dankas mi Dion en pia fidel',  
Ke kreis Li porkon laŭ porka model'.

Por mi ne valoras laboro, nek sport',  
Nek ismoj, nek skismoj, nek... porkoeksport',  
Nek tempoj pasintaj, nek nuna epok'.  
Por mi nur valoras la sterko kaj trog'!

Mi rampas tra l' vivo en plena nesci'  
Pri l' arto, scienco, muzik', poezi',  
Pri Prago kaj Hago, Pekino, Novjork',  
Parizo kaj Pizo: mi estas ja pork'!

Do, se mi nur havus staturon de l' dand',  
Kaj mian soifon estingus per brand',  
Se mi ne en stalo, sed loĝus en dom',  
Mi rajtus nomiĝi ne porko, sed... hom'.

## Jam Pli Ol 2000 Aliĝis al la 100-a UK



Kolono  
de Diino

La statistiko de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Lillo (25 julio – 1 aŭgusto 2015) eniris la trian milon la 11-an de marto, kiam estis asignita la kongresa numero 2003. Laŭ la nombro de aliĝintoj la 100-a UK troviĝas jam sur la 32-a loko inter ĉiuj UK-oj. Ĉar restas ankoraŭ pli ol kvar monatoj ĝis ĝia komenco, ĝi sendube grimpos ankoraŭ multe pli supren en la historia statistiko. Post la 91-a UK en Florenco (2006) tiu en Lillo estos la unua kun pli ol 2000 partoprenantoj.

Kun 549 aliĝintoj Francio, kiu ofte liveras plej multe da kongresanoj eĉ kiam la UK okazas alilande, suverene okupas la unuan lokon. Kun pli ol 100 aliĝintoj sekvas Germanio (153) kaj Japanio (130), dum tiun limon preskaŭ atingis Pollando (92). Aliaj landoj kun pli ol 25 aliĝintoj estas Belgio (81), Brazilo (77), Nederlando (68), Italio (60), Korea Resp. (50), Hispanio (45), Britio, Ĉeĥio kaj Ĉinio (po

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Randy Ream  
1835 N. Natoma Ave.  
Chicago, IL 60707  
773-262-7738  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn  
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.  
1350 N. Wells St., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**24an de Marto** – Amy Alexander rakontos...

**28an de Aprilo** – Temo estos anoncata

**26an de Majo** – Temo estos anoncata

**28an de Junio** – Tradicia kluba pikniko

43), Danio (38), Svislando kaj Usono (po 37), Hungario (35), Finnlando (33), Rusio (30), Litovio (29) kaj Svedio (28). Entute la kongresanaro reprezentas jam 70 landojn.

La aliĝkotojzoz plialtiĝos la 1-an de aprilo. Ĝis tiam validos la malpli kosta tarifo de la nuna kotizperiodo. Oni povas aliĝi per la reta aliĝilo aŭ per papera aliĝilo, kiun oni povas peti de la Centra Oficejo de UEA aŭ de la kotizperanto de UEA en sia lando. –UEA